

Flandra ESPERANTISTO

TIJDSCHRIFT VOOR ESPERANTO-ONDERWIJS EN-PROPAGANDA

Verschiĝnt maandelĝks Vertegenwoordiger in Nederland:
Achtĝtende jaargang L E E N
Nummer 4 (200) sekr. Stadionkade 6, Amsterdam Z.
A P R I L 1951 postrek. 34563 van P. M. Mabesoone
Pythagorasstr. 122, Amsterdam O.

Orgaan van de
VLAAMSE ESPERANTISTENBOND
POSTBUS 342, BRUSSEL
Postrekening 2321.50 van V. E. E.

LIDGELDEN:
* Leden: 75 fr.
* Steunleden: min. 150 fr.
Inwonende leden: 25 fr.
(* met bondsorgaan)

ABONNEMENTEN:
Belgiĝ: 60 fr.
Ceteraj landoj: 75 bfr.
Proefn.: 5 fr. (1 r.k.)

LINGVAJ VIRTUOZOJ ĈE LA UNUIGINTAJ NACIOJ

Al la malpli agrablaj rememoroj el la tempo, kiun ni pasigis studante en mezgrada lernejo, apartenas i.a. tiuj pri verketoj kiel „Pitfalls” kaj „Schwere Wörter”, kies enhavon ni encerbigis al ni por sukcese trapasi la finekzamenon. Ni kredis nin lingvaj spertuloj, sciante ke petrol ne estas petrolo, sed benzino, ke handhaben estas manuzi, manipuli kaj ne (sub)teni, ke bathchair ne estas korbseĝo sed rulseĝo por malsanuloj ke primate en la franca lingvo estas simio sed en la angla lingvo ĉefepiskopo kaj ke novel ne estas novelo sed romano.

La Brita Ministerio por Nutrado eldonis broŝurojn en fremdaj lingvoj pri la porĉiumado de nutraĵoj en Anglujo sed la hispana traduko estis tiel malbona, ke hispano, sciante nur la hispanan lingvon, ne povas kompreni ĝin... Tamen la tradukintoj sendube estas kompetentuloj, lingve multe pli spertaj ol ni, kiam ni faris nian finekzamenon...

Oni certe komprenas, ke la interpretistoj kaj tradukistoj ĉe la Unuigintaj Nacioj estas specialistoj pri lingvistiko kaj tamen eĉ tiuj „superspecialistoj” kelkfoje faras erarojn...

En „Wordende Wereld” (febr. '51) troviĝis interesa artikolo pri tiuj lingvaj virtuozoj, kiun tradukis s-ro C. B. Zondervan. Jen sekvas kelkaj fragmentoj:

„Wisjinski paroladas. Kun akra sarkasmo li kritikas la okcidentajn potencojn, sed tion li faras ruslingve, do la vizitanto, kiu ne scias tiun lingvon, komprenas neniom. La kaptelefono kaj komputilo tamen solvas la problemon. La interpretisto George Sherry tradukas la paroladon en la anglan lingvon kaj li ne nur tradukas! En lia voĉo sonas la sama sarkasmo, la sama akcento; li eĉ uzas la samajn vortludojn kiel la diplomato. Tiel rapide kaj tiel precize li sekvas la rusan diplomaton, ke oni vere demandas sin, ĉu la interpretisto disponas pri duobla cerbo!


Unu el la plej lertaj interpretistoj estas Jean Pozan, nur 23-jara, tamen unu el la spertuloj en ĉi tiu rondo eminenta de lingvo-virtuozoj. Li laboras mirige trankvile, skribas leteron, mansalutas amikon en la salono, transdonas noton al alia interpretisto kaj intertempe plenumas sian nervostreĉan taskon: la angla lingvo de la parolanto eniras la orelojn de Pozan kaj tuj forlasas lian buŝon en perfekta franca traduko.

Por tia laboro oni devas disponi pri eksterordinaraj talentoj. La interpretisto kvazaŭ eniru en la haŭton de la parolanto kaj antaŭsentu, kion ĉi tiu diros, jam antaŭ ol tio estas dirita. Li do nepre bezonas fundan scion ankaŭ pri la traktata temo. Foje okazis, ke interpretisto korektis unu el la delegitojn, ĉar, ne sciante sufiĉe la anglan lingvon, ĉi tiu diris ion alian ol li intencis diri. La interpretisto pravis!

Nuntempe 67 interpretistoj kaj tradukistoj laboras ĉe la U.N. Ilia aĝo varias inter 23 kaj 61 jaroj. Inter ili estas komponistoj kaj inĝenieroj, advokatoj kaj tajpistinoj, avoj, kaj fraŭloj, vidvinoj kaj eksedzinigintaj virinoj. Ilia salajro sumiĝas je 20.000—35.000 guldenoj en jaro, senimposte! Kelkaj el ili estas veraj mondvagantoj ekz. Ina Telberg, doktorino pri sociologio, kiu loĝis en Siberio, Mongolujo, Koreo, Japanujo, Hindujo, Francujo, Anglujo, Germanujo, Svedujo, Danujo kaj Usono. La lingvojn de tiuj landoj ŝi parolas preskaŭ korekte! Komprenable la alta salajro estas allogaĵo, sed laŭ G. Rabinovitsj, la direktoro de la tradukservo de la U.N., en la tuta mondo troviĝas eĉ ne 100 tiaj lingvoartistoj. Antaŭ nelonge li ekzamenis en Parizo 350 kandidatojn, kiujn ni, simplaj homoj, nomus lingvomirakloj. Rabinovitsj tamen povis uzi nur ses el ili...

Kiom da mono kaj tempo perdiĝas pro la tradukado! Kial ne ŝpari tempon kaj monon per uzado de Esperanto? Ĉu tiu lingvo eble por diplomatoj estas tro klara kaj tro logika?...

UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO



MÜNCHEN

4—11 AŬG. 1951

Wereldnieuws

Een grote openbare propagandaavond op Maandag 19 Maart vormde het slot van de door het dagblad voor de Zaanstreek, „De Typhoon” gegeven Esperanto-cursus, waaraan door ruim 300 cursisten werd deelgenomen. Aanwezig waren o.a. de loco-burgemeester van Zaanadam en de heren A. Cseh en S. Pragano.

Het dep. van opvoeding in Rio Grande do Norte (Brazilië) heeft zijn goedkeuring gehecht aan invoering van Esperanto als facultatief leervak op de openbare scholen.

Voor het deze zomer te München te houden Internationale Esperanto-Congres hebben zich reeds ongeveer 1000 deelnemers uit 27 verschillende landen aangemeld.

Zo juist is een Esperanto-vertaling verschenen van de Zweedse „best-seller” Kon-Tiki van Thor Heyerdahl, die reeds in verschillende talen is verschenen. Ook het bekende toneelstuk „De Wereld heeft geen Wachtkamer” van Maurits Dekker is thans in Esperanto verkrijgbaar, in de vertaling van F. Faulhaber.

U.E.A., de wereldbond van de esperantisten, telde eind Febr. 1951 in totaal 7011 leden. Eind Febr. 1950 bedroeg dit aantal 6429.

De gemeenteraad van Angers (Fr.) besloot aan een van de straten van Angers de naam „rue du dr Zamenhof” te geven.

Evenals het vorige jaar zullen de Kopenhaagse studenten-esperantisten, daartoe door fin. steun van de Deense regering in staat gesteld, een werkkamp voor archeologen organiseren, dat van 3-17 Juli a.s. op het eiland Bornholm zal worden gehouden en waaraan studenten, leerlingen van kweekscholen en onderwijzers van alle landen kunnen deelnemen.

Tot nu toe zijn in Esperanto 107 vakwoordenboeken voor 44 verschillende takken van wetenschap en techniek verschenen. Het Japanse Esperanto-Instituut is begonnen met de samenstelling van een alg. wetenschappelijke terminologie.

Sen la entuziasmo dormetas en ni la plej bonaj fortoj — kuŝas en ni tindro, kiu petas fajrerojn.

Herder.

1. La „alfa” ondoj kiuj estiĝas dum la dormado, la hipnota dormado kaj la narkoto.
2. La „beta” ondoj tute diferencaj laŭ longeco kaj ofteco de la „alfa” ondoj kaj klare montrantaj la maldorman staton.

Per tio la aserto ke ĉiuj hipnotigatoj estus ŝajnigantoj, estis klare refutata.

D-ro Koster (nervokuracisto en Amsterdam) estas la aŭtoro de la verko „Het leerboek der Hypnose — (la lernolibro de la hipnoto). Tie ĉi sekvas kelkaj citaĵoj el tiu plej grava verko:

„Estas absolute necese ke ĉiu nervokuracisto konu la hipnoton, tial ke la granda plimulto el la personoj, kiuj konsultas nervokuraciston, havas funkciajn plendojn kaj ne estas kuracebla alie ol per sugesta terapio. Certe ankaŭ kuraciloj efikas, sed la efiko je funkciaj plendoj estas kutime malgranda kaj la danĝero ne estas imaga. Serio da mortkazoj estas priskribita pro „agranulocytosis”, kaŭzita de kuraciloj, kiujn oni opiniis tute sendanĝeraj. La hipnoto, diras d-ro Koster, estas stato de malpliigo de la konscio, en kiu la sugesteblo estas pligrandigita, la memvolaj ideoj kaj la impulsoj de la volo estas malpliigitaj, dum krome la vegetativaj centroj estas senaktivigitaj, se ne estas donataj ekscitantaj sugestoj. Fakte mi ne povas vidi esencan diferencan inter la stato de somnambulo kaj la hipnoto.”

Alia ekzemplo de malpliigo de la konscio estas la sensenteco de soldatoj, kiuj en la ordo de la batalo ne rimarkas siajn vundojn ĝis ili vidas la sangelspruĉon.

La klarigon pri tiu stato oni serĉu en la forta ekscito de certaj ŝelaj regionoj, per kiu ĉiam estiĝas senaktivigo de la aliaj ŝelaj regionoj. Kvankam hipnoto povas ŝajni simpla en spertegaj manoj, oni atingus sen ĝisfunda kono kaj bona talento de hipnotiganto (kiuj efektive estas maloftaj) nur seniluziigojn kaj malmultajn rezultojn.

Normala intelekto estas la plej taŭga por hipnoto. La hipnotigeblo malkreskas ĉe la spiritmalfortuloj.

VERDA STELO.

La vivo kiu diras: „Mi konas la pacon ĉar mi estas satigita”, sentas post dekdu aŭ dekkvar horoj, ke li ne konas la pacon.

K. van de Woestijne.

La espero nutras min, ĝi nutras ja la duonan mondon, kaj mian tutan vivon mi havis ĝin kiel kunulon. Kio aliokaze estus fariginta el mi?

L. van Beethoven

RIMARKINDAJ PERSONOJ EL LA HISTORIO DE LA HIPNOTISMO

Tiu ĉi mallonga resumo entenas citaĵojn el jenaj verkoj: „L' Hypnotisme et le mystère cérébral” de d-ro Völgyesi; „Les ondes cérébrales et la psychologie” de Jean Delay kaj „Het leerboek der hypnose” de d-ro S. Koster.

D-ro Anton Mesmer naskiĝis en Isnang en la ĉirkaŭaĵo de la lago de Boden en 1734. Ĉirkaŭ 1766 li transloĝiĝis al Parizo kaj farigis privata kuracisto de Marie-Antoinette. Li tuj estiĝis maltrankvilon per sia nekutima praktiko de la kuracarto. Mesmer efektive kuracis siajn pacientojn per tio, kion li nomas magneta aŭ besta fluido. Li klopodis akiri oficialan rekonon de siaj teorioj fare de la akademio kaj de la kuracistaro. Sed la vereco de la akiritaj rezultoj estis pli grava ol la oficiala rekono de liaj teorioj kaj de la ekzisto aŭ ne-ekzisto de la tiel nomata magnetismo. Mesmer mortis en Svisujo en 1815.

D-ro James Braid naskiĝis en Skotlando en 1795 kaj mortis en 1860. Li estis kuracisto en minejo. En 1841 li ĉestis prezentadon de la teatra hipnotiganto la Fontaine, nepo de la fama fabelisto. La eksperimentoj tiel interesis lin, ke li diligente ilin pristudis kaj baldaŭ li aplikis hipnoton por estiĝi sendolorigon en ĥirurgiaj operacioj. Ankaŭ d-ro Esdaille samele aplikis hipnoton. Oni iufoje riproĉis al Braid, ke li perfidis la profesian sekreton priskribante la eksperimentojn faritajn je la pacientoj. Tamen restis al li kiel izolita defendanto de siaj teorioj neniu alia rimedo.

En 1844 li skribis: Mi ne estas maltrankvila pri la sorto de la hipnotismo; spite la senĉesan kontraŭbataladon mi havas la konvinkon, ke la vero por kiu mi batalas, ankaŭ alportos la rimedojn por mildigi la homajn suferojn.

La abato Faria: Portugala pastro kiu vivis longtempe en Hindujo montris en 1813 en Parizo antaŭ elita publiko provojn pri hipnoto. Faria metis la provpersonon antaŭ sin, fikse rigardis lin kaj estiĝis hipnoton dum kiu li farigis al tiu persono eksperimentojn kiajn oni nuntempe ankoraŭ vidas.

D-ro James Esdaille (1808—1859) estas ĉefe konata pro la granda nombro da operacioj, kiujn li faris, dum la paciento estis sendolorigita per hipnoto. Esdaille estis ligata al la Orient-Hinda kompanio. La 4-an de Aprilo 1845 li hipnotigis hindon por operacio de ambaŭflanka hidropso de la skroto. La hindo farigis sensenta. Tio estis la komenco de serio de miloj da operacioj, inter kiuj 300 grandaj. Efektive 75 sendolorajn operaciojn per hipnoto, li skribis pri tio al la medicina administracio, sed li ne ricevis respondon. Esdaille sendube estis eksterordinara homo, ĉar krom pri hipnotiga influo, li disponis ankaŭ pri vera naturdoto por ĥirurgio.

La kuracistaro el la tempo de Esdaille sin malmulte okupis pri liaj laboroj, krom por ilin kontraŭbatali aŭ ridindigi; ili eĉ asertis ke la pacientoj de Esdaille, por plezurigi lin, ŝajnis ke ili ne havas dolorojn.

Ivan Petrovitch Pawlow (1849—1936). Dum mia esplorado pri la kondiĉaj refleksoj, diris Pawlow, la valoro de hipnoto malkaŝis sin aŭtomate. La interna senaktivigo, la dormado kaj la hipnoto sekvas fakte unu saman fiziologian proceson. La unutona ritma ekscitado de kiu ajn punkto de la cerba ŝelo estiĝas pli aŭ malpli rapide internan senaktivigon; la atento haltas kaj farigas nebla. Tiam venas la spirita laceco, kiu estas la dormetemo, poste la dormado kaj la hipnota dormado.


La angla fiziologiisto Caton malkovris la cerban elektron en 1875. Caton kiu enigis elektrodojn en la griza cerbmaterio de simio, subite vidis sur la galvanometro ritmajn vibradojn kiuj malkaŝis la ekziston de elektra fluo.

La pli fundaj esploroj de Profesoro Berger klare montris la ekziston de du diversaj cerbaj ondoj.

(daŭrigo en la 3-a kolono)

OBSERVOJ

HILVERSUM.



La esperantistoj el la Nederlando kunvenos en unu kongreso. Fakte sen precedenco en la historio de Esperanto! Komune de nacia lingvo, de historia pasinteco, de kutimoj, de tradicioj, de intereso pelis nin al komuna laboro, ankaŭ sur la kampo de la internacia lingvo.

Antaŭ proksimume du jaroj mi skribis, ke post duona generacio ni eble jam kunvenos en unu kongreso. Mi eraris nur je duona generacio minus du jaroj...

Geamikoj el Nordo kaj Sudo, Hilversum vokas nin kiel esperiga, unua mejloŝtono sur larĝa, nova vojo plena de esperoj kaj promesoj. Manki al tia rendevuo envere estus nepardoneble!

Pik.

HILVERSUMA KONGRESO ALIĜIS ĜIS 15-III

70 fino M. Nederkoorn, Doetinchem, 71 s.ro C. Baans, Velp, 72 fino A. Bink, 73 fino C. Pekelaar, 74 fino H. Schenk, ĉiuj en R'dam, 75 s.ro L. Burger, Den Haag, 76 fino S. Geertsema, Leiden, 77 s.ro J. Kuypers, R'dam, 78,79 ges.roj Timmerman, Den Helder, 80 fino J. Lehnen, Den Haag, 81 s.ro A. Hoogvliet, R'dam, 82 fino J. Aafjes, R'dam, 83,84 ges.roj Albers, 85,86 ges.roj De Vries, 87 fino H. Kiers, 88 fino A. Tebbenhof, 89 fino M. Meywes, ĉiuj en Groningen, 90 fino A. Middelkoop, 91,92 ges.roj Koopmans, 93 s.ro A. Mos, ĉiuj en Hilversum, 94 s.ro P. v. Boven, R'dam, 95 s.ino A. Wijnenbergh, A'dam, 96,97 ges.roj Baas, A'dam, 98 fino C. Reas, Zaltbommel, 99 s.ino M. Kaptein, A'dam, 100 s.ro A. Lodema, A'dam, 101 fino Alexander, Hilversum, 102 s.ro J. Holleman, Groningen, 103 fino M. Hootsen, Hilversum, 104 s.ro M.v.d. Kreeke, Leiden, 105,106 ges.roj Fekken, Hilversum, 107,108 ges.roj Drayer, 109 fino R. Drayer, Velp, 110 s.ino M. A. v. d. Wal Arnhem, 111 s.ino M. Bongers, Den Haag, 112,113 ges.roj Böttcher, Leeuwarden, 114 fino J. Terrya, Gent, 115,116 ges.roj Vermuyten, Antwerpen, 117 fino A. Breedveld, Heenstede, 118 s.ro A. v. Dieren, Bussum, 119 fino J. Kanpegier, Den Haag, 120 s.ro K.v.d. Wal, Hoogeveen, 121,122 ges.roj Debrouwere, 123,124 s.ro K., fino L. Debrouwere, Kortrijk, 125 s.ro Chr. Slijper, Utrecht, 126 s.ro C. Geyer, Bilthoven, 127 s.ino J. v. d. Jagt, Hilversum, 128 s.ino L. Rassmayr, Salzburg, 129 fino J. Dijkstra, Heemstede, 130 s.ino M. Rubingh, Leiden, 131 fino N. v. d. Weide, Leeuwarden, 132 s.ro G. Maertens, St. Kruis, 133 fino M. Joyeux, 141 fino M. Roels, 135 fino H. Hofman, 136 fino M. Roose, ĉiuj en Brugge, 137 s.ino M. Marechal, Assebroek, 138,139 ges.roj Roose, 140 s.ro A. Dumarey, 141 s.ro R. Martens, ĉiuj en Brugge, 142 s.ro E. de Baets, Assebroek, 143 s.ro A. Crois, 144,145 ges.roj Iserentant, ĉiuj en Brugge, 146 fino J. v. Thiel, A'dam, 147 fino S. A. v. d. Zee, Berlikum, 148 fino v. Holle Meersch, St. Andries, 149 fino C. Lemaitre, Kortrijk.

KOMPATINDAJ GERMANOJ

La fezo kaj ĉarlatanaĵoj de d-ro(?) Tadros Megalli evidente tiom imponis la germanajn samideanojn, ke „La Ponto“ i.a. parolas pri „Erfolge, die sich lawinenartig vergrößerten“, „Massen, die begeistert wurden“ „Journalisten, die ihren Kollegen(?) aus Aegypten im gegenseitigen Wettlauf interviewt haben“...

Niaj kompatindaj germanaj amikoj nun troviĝas antaŭ la dilemo ĉu ne inviti veran doktoron-oratoron ĉar la germana lingvo estas tro malriĉa por raportoj pri li, ĉu senprokraste krei kelkajn neologismojn por ke almenaŭ balbute ili povu esprimi sian entuziasmon...

La frato de Pik.

F.L.E. 40-JARA

La Asocio de Lab. Esp.-istoj F.L.E. en la regiono de la ned. lingvo (ĝi havas sekciojn ankaŭ en Flandrujo) festas sian 40-jaran ekziston. Fondita en 1911 ĝi travivis post 1928-a periodon de kresko, per kiu ĝi fariĝis la plej forta E.-organizo en Nederlando. La membronombro, kiu en 1938-a superis 5000 nun estas proks. 2500. F.L.E. prizorgis multajn radio-elsendojn pere de V.A.R.A., eldonis plurajn lernolibrojn, skribajn kursojn kaj la konatajn romanseriojn. La du asociaj gazetoj „Lab. Esp.-isto“ kaj „La Progresanto“ atingis resp. 20-an kaj 18-an jarkolekton. La jubilea kongreso okazis je Pasko en Amsterdam. La gen. sekr. de L.E.E.N. salutis la kongreson kaj donacis florojn kaj koverton al la jubileanta asocio.

Uitwerking van de opgaven in het vorige nummer:

1. Oni nomas Ĉinujon la lando (bep. v. gesteldh.) de la leviganta suno. 2. Li estas same aĝa (niet maljuna!) kiel lia (onderwerp!) fratino, sed du jarojn malpli aĝa ol lia frato. 3. Kiom malvarme estas ĉi tie! 4. Jam dum pluraj semajnoj la infanoj ĝojis pro la proksimiganta ferio. 5. Tiom da mono kiom li povas elspezi, mi ne posedas. 6. La knabo jetis la katon en la akvon por dronigi ĝin. Post kelkaj minutoj la kompatinda besto estis droninta. 7. Ju pli ofte vi ekzercas vin, des pli bone vi lernos paroli Esperanton. 8. La patro sentis sin malsana kaj tuj iris hejmen. 9. Se mi ne konus vin pli bone, mi opinias ke vi mensogas. 10. La dudek unuan de marto komenciĝos la printempo. 11. Li rakontis al mi, ke li deziras fariĝi instruisto. 12. Mi scias ke estas malfacile, levi tian pezan ŝarĝon.

Rigardante la mondkarton antaŭ deko da jaroj oni vidis ankoraŭ grandan nombron da blankaj makuloj: nekonata tero kien ankoraŭ neniam penetris blankulo, tero, kiu ĉiuokaze ankoraŭ ne estis kartografita kaj pri kies mistero la natursploristoj sciis preskaŭ nenion.

Kiam aperis la radio, komence ŝajnis, ke ĝi tute forpelos la gramofonon. Baldaŭ tamen montriĝis, ke la timo de la fabrikistoj de gramofondiskoj estis senbaza, ĉar la radio kontraŭe progresigis la vendon de bonaj diskoj.

KOMUNIKOJ DE LA LIBRO-SERVOJ.

Rekomendindaj studverkoj por diplomo B:	Gld.	Belg. Fr.
Plena Vortaro	11,50	175,—
Tra la labirinto de la gramatiko, de Faulhaber	5,90	85,—
La Konsilanto, de Degenkamp (nur 2 ekz.)	1,65	—
Esprimo de sentoj en Esperanto, de E. Privat	—,85	—

Rekomendinda literaturo por diplomo B:

Fundamenta Krestomatio, de Zamenhof (bind.)	5,20	—
Kredu min, sinjorino!, de C. Rossetti (bind.)	5,40	73,—
Hamleto, trad. Zamenhof	1,50	—
Fabeloj de Andersen III, trad. Zamenhof	2,30	—
La Lanternistoj, trad. K. Bein (bind.)	2,50	34,—
La vojoj estas nekonataj (bind.)	2,50	34,—
Vivo vokas, de Stellan Engholm	4,50	—

Aliaj bonaj verkoj:

La mondo ne havas atendejon, de Maurits Dekker	2,50	—
Miru-Pensu-Ridu, de P. Bennemann (bind.)	5,40	73,—
Esperanta Krestomatio (kart.) por ekzameno A	1,50	24,—
La fundo de V mizerio, trad. K. Bein	1,25	—
Rembrandt, la magiisto (bind.)	5,—	68,—
Skizoj pri Nederlando (nur kelkaj ekz.)	1,75	—
Komercaj leteroj	1,30	—

Unika okazo por libro-amantoj:

Retoriko, de prof. d-ro I. Lapenna, kun aŭtografado de la aŭtoro. Nur kelkaj ekz. Mendo tuj! 70,—

MENDU ĈE

Boekendienst L.E.E.N., Z.O.-singel 5, Bergen op Zoom, (giro 76915)
Vlaams Esperanto-Instituut, Blankenberge steenweg 72, Brugge (p.c.r. 3268.51)

Inter la minaco de proksima milito kaj la promeso de senzorga paco ekzistas tria eblo, kiu povas esti la plej probabla: longa periodo de paco ne senzorga, sed zorgoplena kaj necerta.

Ekzercero pri vortfarado

Traduku ne uzante vortaron:
Schildwacht — examinandus — inzepen — kriegsgevangene — in vervulling gaan — lafaard — voorouder — levendigheid — hoofddeksel — meerderjarige — pikdonker — postbode — dictatorial — ongelikte beer — onvolmaakt — onvermoeibaar — aannemelijk — servet — deken — heel — vrek — gedenkwaardig — huisgenoot — oorvijs — opvliegend — knechten (werkw.) — kwijnen — afluisteren — schort.

Paŝe — homevita — senkonkida — konfesprenanto — subĉiela banejo — eksedziniĝi — kompatindulo — sindona — miskonduti — etulo — litvagono — proksimulo — malvigla — subrigardi — malmunti — aktiveco — senŝeligi — harfendado — translogiĝi — kritika.

Korektu la jenajn frazojn:
1. Pro ke li estas malsana, li morgaŭ ne iras al la lernejon. 2. Li restis trankvila sidi en la momento ke mi eniris la ĉambron. 3. Ĉu vian amikon jam estas resaniĝita? 4. La prezo de ĉi tiu libro estas du guldenojn; bindite ĝi kostas unu guldenon pli. 5. Oni elektis s-ro'n Jansen kiel presidento de la asocio. 6. De la du fratinoj Karlo povas kanti la plej bele. 7. Li malavare rekompenzis la trovinton, donanta lin grandan sumon da mono. 8. Ĉu la produkto de kvin kaj kvar estas dudek?

Subpropoziciaj Verbotempoj

La verbotempoj de la diversaj subpropozicioj kondukatas dumaniere al la ĉefpropozicia tempo; ili povas esti absolutaj (signantaj la tempon sen rilato al la ĉefpropozicia tempo) kaj relativaj (rilatigitaj al la ĉefpropozicia tempo). La relativaj verbotempoj ofte kaŭzas malfacilaĵojn, ĉar ili ne kongruas kun la tempoj, uzataj en la naciaj lingvoj.

Relativa estas la subpropozicia tempo a: en subpropozicioj eksplikaj, enkondukataj per la subjunkcio ke; ekz.: ŝajnis, ke pluvos; li havis la opinion, ke li sukcesos; mia decido estis, ke mi ne iras tien; ĉion li atendis de tio, ke la sorto lin favoros; mi ĝojis, ke vi venos. La prezenco signas samtempecon rilate al la tempo de la ĉefpropozicio, la preterito signas antaŭtempecon, la futuro posttempecon rilate al ĝi, ekz.: mi vidis, ke li falas (samtempeco); mi vidis, ke li falis (antaŭtempeco); mi vidis, ke li falos (posttempeco). b: en ĉiuj dependaj demandoj, ekz.: estis la demando, ĉu li venos; estis dubo, kiam li venos; mi ne sciis, kiu alportos la leteron. Post verboj vidi, aŭdi, rigardi, aŭskulti, rimarki, k.s. oni povas uzi en la subpropozicioj enkondukataj per kiel tempojn absolutajn aŭ relativajn preskaŭ laŭplaĉe: mi vidis, kiel li kuris; mi aŭdis, kiel bruas la plandoj de V marsantaj soldatoj. La lasta formo estas pli vigl-elekta.

Speco de objekta subpropozicio estas la t.n. nereкта parolo: frazturno per kiu oni citas ies parolon en formo de

VERDLANDO VOKAS

Listo de radio-disaŭdigoj en aŭ pri Esperanto kaj informoj. Tempindiko laŭ MET (= mezeŭropa tempo) valida ankaŭ en Nederlando kaj Flandrujo.

Mallongigoj: I = informoj. P = parolad(et)o. K = kurso. M = muziko.

Dimanĉe:

17.00-17.20 Romo, 19,5 m, 31,1 m: I kaj M.
19.00-19.15 Sofio, 39,11 m: I.

Lunde:

6.30-6.35 Vieno, 25 m, 30 m, 41 m, 48 m, 513 m: I.
8.15-8.30 Stokholmo, 19,80 m, 27,83 m: I.
8.45-9.00 Rijssel (Lille), 235 m: P.
15.30-16.— Rio de Janeiro, 30,71 m, 375 m: K.
16.15-16.30 Stokholmo, 19,80 m, 27,83 m: I.
23.15-23.20 Hilversum I, 402 m, VARA: I. (Nur ĉiudusemajne: 2-IV-'51. ktp).

Marde:

2.15-2.30 Stokholmo, 19,80 m, 27,83 m: I.
12.55-13.00 Berno, 13,94 m, 31,46 m, 48,66 m: P. de d-ro Arthur Baur.
18.35-18.40 Berno, 19,60 m, 31,46 m, 48,66 m: Ripeto de la tagmeza dissendo.

Merkrede:

0.30-0.45 Gvatemalo, 49 m: I.
19.00-19.15 Sofio, 39,11 m: I.
22.35-22.40 Vieno, 25,48 m, 513,7 m: I.

Ĵaŭde:

9.30-9.45 Parizo, 48,39 m, 347 m: K.
12.55-13.00 Berno, 13,94 m, 31,46 m, 48,66 m: P. de d-ro E. Privat.
18.35-18.40 Berno, 19,60 m, 31,46 m, 48,66 m: Ripeto de la tagmeza dissendo.
18.10-18.25 Vieno, 30 m, 203 m: P. (ĉiun duan ĵaŭdon).

Vendrede:

17.00-17.20 Romo, 19,5 m, 31,1 m: I kaj M.
19.00-19.15 Sofio, 39,11 m: I.

Sabate:

23.15-23.20 Hilversumo II, KRO, 298 m: I

Informojn pri Esperanto-radio-elsendoj sendu ne nur la radio-stacioj, sed ankaŭ la radio-aŭskultantoj al: S. S. de Jong Dzn, Radio-Servo N.C.K.E., Waltaweg 3, Tjerkwerd (Fr.), Nederlando.

INTERNACIAJ KONGRESOJ

I.K.U.E.:

München 4-11/VIII (samtempe kun la Universala Kongreso de Esperanto). Informoj: pastro L. Thalmaier, 13 b Bad Kohlgrub (Germ.).

K.E.L.I.:

Markt-leuthen (Germ.) 28/VII- 4/VIII. Informoj: pastro Hoppe, 13 a Markt-leuthen 100, Bayern, (Germ.).

S.A.T.:

Stockholm 28/VII - 3/VIII. Informoj: s-ro Y. Nilson, Förvaltarvägen 20 Enskede (Sved).

INTERNACIAJ FERIAJ KURSOJ

okazos 22-29 julio en Helsingör (Danlando)

Karavano el Nederlando aranĝata de s-ro P. Mabesoone, Pythagorasstr. 122, A'dam-O

Detala prospekto ĉe L. Friis Ingemannsvej 9, Aabyhøj (Dan.)

tion. Estus bone, se ili enkondukus Esperanton kiel — internacian lingvon. Fakte ĉiu laboristo devus konsideri — devo lerni Esperanton.

laŭ „Nia Informilo“ de Isosek.

Vertaal:

Op een clubavond vertelde een wereldreiziger voor de zoveelste maal een avontuur, dat zijn vrienden al zo dikwijls gehoord hadden, dat zij de geschiedenis woordelijk van buiten kenden. Hij vertelde, hoe hij in de Far West van Amerika aan de dood ontsnapt was. „De nacht daalde over het landschap... Ik stond op een hoge brug en bewonderde de indrukwekkende omgeving. Voor mij grapte een diepe afgrond... „Zeg“, onderbrak toen een van de clubvrienden, „gaapte die afgrond al, voordat jij er kwam?“

Uitwerkingen van Vlaamse cursisten voor 20 April aan V.E.B., Studanto, postbus 342, Brussel, van Nederlandse cursisten aan A.J. Kalma, Stadionkade 6, Amsterdam-Z.

NED. ESPERANTISTEN-VEREN. „LA ESTONTO ESTAS NIA“

Alg. Secretariaat, schr. cursus voor beginners en uitleendienst:
Mr A. J. Kalma, Stadionkade 6, Amsterdam-Zuid, tel. 96160.
Penningm.: P. M. Mabesoone, Pythagorasstr. 122, Amsterdam-O, postrek. 34563.
Boekendienst, schr. cursus voor gevorderden en dipl. B: H Appel, Z.O.-singel 5, Bergen op Zoom, postrek. 76915.
Bibliotheek: E. A. Koot, Joh. de Meesterstraat 12, Utrecht.
Propaganda-dienst: H. Bakker, Van Tuylplein 33/1, Amsterdam-Zuid, tel. 95320.
Alg. Ned. Esp. Examen-comm.: Mej. H. M. Mulder, Zilvermeeuwstr. 29, Badhoevedorp
Ceddel. U.E.A.: P. Moen, Schaarsbergenstraat 104, Den Haag, postrek. 79167.

Flandra Ligo Esperantista.

Postbus 342, Brussel.

Sekretario: G. Maertens, Prins Leopoldstraat 51, Sint-Kruis.
U.E.A. peranto: Dr. F. Couwenberg, Koninginnelaan 14, Blankenberge P.C. 4161.35.
Redakcio F.E.: Dr. T. van Gindertaelen, Louisastr. 23, Mechelen.

KOMUNIKOJ DE LA ĈEFESTRARO

Afable ni petas niajn ĝeneralajn gembrojn kaj abonantojn pagi la kotizon aŭ abonprezon por la jaro 1951 en poŝtkonto 34563 de nia asocio antaŭ la 30-a de aprilo. Post tiu dato ni disponas pri la ŝuldataj monsumoj per poŝtkvitanco, aldonante g. 0,25 kiel koston de enkasigo. Diversaj sekcioj ne pagis la ŝuldatan kontribuon por la unua duonjaro. Sekciaj kasistoj, bonvolu ekagi, por ke via sekcio ne risku perdon de voĉdonrajto en la jarkunveno kaj interrompon de regula alsendo de „Nederlanda Esperantisto“ al viaj anoj.

La supran duonon de la formularo por la delegitoj al la jarkunveno la sekciaj sekretarioj resendu al la ĝen. sekretario antaŭ la 20-a de aprilo.

Ekzamenoj A kaj B okazos la 3-an de majo (Cielirtagon) en Amsterdam kaj Leeuwarden. Prospektoj senpage haveblaj ĉe la ĝen. sekr. de L.E.E.N. Por la Cielirtagaj ekzamenoj oni anoncu sin senprokraste!

Ĉiujn deziratajn informojn pri la karavanvojaĝo al la Universala Kongreso de Esperanto, okazonta 4-11 aŭg. en München, volonte donas al vi la karavangvidanto s-ro W. Böttcher, P.C. Hooffstraat 25, Leeuwarden.

ASOCIA JARRAPORTO - LA ESTONTO ESTAS NIA -

(fino)

Biblioteko: Raporto pri la biblioteko aperis en la februara numero.

Propaganda Servo: Raporto pri la propaganda servo aperis en la februara numero.

Teatra Servo: Raporto troviĝas en ĉi tiu numero.

Nederlanda Centra Komitato Esperantista: En mia enkonduko mi jam menciis, ke N.C.K.E. revigligis en 1950. Aligis al N.C.K.E. la nederlanda societo de blindaj esperantistoj (No So BE). De la nova broŝuro „Esperanto, de wereldhulptaa“ N.C.K.E. presigis 20000 ekzemplerojn; krome ĝi aranĝis la prelegserion de Tador Megalli kaj starigis radio-servon (gvidanto S. S. de Jong). Raporto de la dokumenta servo (gvidanto s-ro G. P. de Bruin) aperis en nia organo. La decido sendi al ĉiuj sekcioj cirkuleron por rekomendi fondon de lokaj kunlaborkomitatoj kaj disponigi spertajn prelegantojn por komunaj kunvenoj, pro de ni nekonata kaŭzo neniam estis efektiva. Reprezentantoj por L.E.E.N. estis s-roj A. J. Kalma kaj F. Weeke. Kiel prezidanto funkciis s-ro A. v. Haren, kiel sekretario s-ro J. Pouli.

Ekzamena Komitato: Raporto pri la ekzamenoj en 1950 troviĝas en la antaŭa kaj ĉi tiu numeroj.

Oficejo „Esperanto ĉe la Instruado“: Reprezentanto de L.E.E.N. estis s-ro P. W. Baas, kiu funkciis kiel prezidanto. „Mededelingsblad“ de la oficejo kombiniĝis kun „De Esperantist“ je unu gazeto, kiu propagandecle estis sendata al parlamentanoj, instruaj inspektoroj kaj multaj lernejoj. Se la esperantistaro deziras, ke la eldonado estu daŭrigota, ĝi nepre pli fervore subtenu ĝin. (Oni relegu la artikolon „varbu donacantojn per „De Esperantist“ en la februara numero). Malavara privatula donaco, subtenita de monkolleto fare de N.C.K.E. ebligis la aranĝon de porinstruista kurso en Havelte. Bedaŭrinde la nombro da partoprenintoj ne estis konforma al la atendoj. Cetere la kurso, gvidata de s-ro A. Cseh, bonege sukcesis. En la fino de la jaro la oficejo denove sin turnis al la ministro kaj parlamento, petante devigan instruon de Esperanto en la seminarioj.

Universala Esperanto-Asocio: La ĉefdelegito de U.E.A., s-ro P. Moen, regule ĉeestis la ĉefestrarkunvenojn. Komitatoj estis s-roj P. W. Baas kaj F. Weeke. S-ro Baas reprezentis L.E.E.N. en la Pariza kongreso. La ĉefdelegito kiel kutime voĉlegos la raporton pri 1950 en la jarkunveno en Hilversum.

Estas stranga fenomeno, ke kvankam la disvastigo de Esperanto estas nia

plej grava celo, diversaj sekciaj estraroj unualoke okupis sin pri la problemoj kiel havigi agrablajn vesperojn al siaj anoj kaj ne cerbumis pri la aranĝo de publikaj propagandkunvenoj. La propaganda laboro estas farata de multaj aktivuloj, kiuj kvankam superŝutitaj per laboro, iel trovas okazon kaj tempon por montri sian aktivecon kaj pro tio meritas multan dankon, sed la granda plimulto, kiu „ne estas kapabla kaj ne havas tempon“ faras malmulte aŭ nenion. Trankvile ili atendas la likvidigon de L.E.E.N. Nu, ju pli baldaŭ venos la momento, kiam ni povos likvidi nian asocion, des pli bone. Eble tiuj vortoj ŝajnas iom paradoksaj, sed laŭgrade kun la disvastigo de Esperanto la Esperanto-asocioj ja perdas sian ekzistrajton! Tamen en la nuna momento multe da laboro estas ankoraŭ farenda kaj multaj brikoj bezonataj por la finkonstruo, kaj L.E.E.N. faru de tiu laboro sian parton kaj ĉiu el ni alportu sian brikon, ne lasante tiun taskon al aliaj! Se ĉiu el ni agos laŭpove kaj plene konscias pri sia tasko, ne estos kaŭzo por pesimismo rilate la sanstaton de „La Estonto Estas Nia“.

La ĝen. sekretario.

PROPONOJ POR LA JARKUNVENO

Sekcio Groningen proponas:
La ĉefestraro insiste petu en la U.E.A.-kongreso en München, ke Esperantaj eldonoj aperu nur ĉe oficialigitaj eldonistoj kaj ke oni esploru la eblon oficialigi certajn eldonistojn nur por la eldonado de Esp. verkoj.

Klarigo: Librojn, eldonitajn de neoficialigitaj eldonistoj la libristoj ne rajtas havi en stoko.

Opinio de la ĉefestraro: Ni faru tiun vanan klopodon.

La ĉefestraro sendu oficialajn salutoleterojn al ĉiuj landaj Esp. kongresoj kaj petu en la U.E.A.-kongreso en München, ke aliaj landaj asocioj faru la saman.

Klarigo: Tio efikas propagande, kiam neesperantistaj aŭtoritatuloj ĉeestas landan kongreson.

Opinio de la ĉefestraro: Nenio kontraŭ.

La ĉefestraro esploru la eblon fabrikigi ŝildojn kiel la antaŭajn U.E.A.-ŝildojn.

Klarigo: Diversloke la ŝildoj malarperis kaj ĉe oficejoj de A.N.W.B., K.N.A.C. aŭ V.V.V. ili povus havi propagandan valoron.

Opinio de la ĉefestraro: Siatempe la gvidanto de la propaganda servo atentigis la sekciojn pri la decido de „Ned. Spoorwegen“, konsilante al la sekciaj estraroj pendigi la ŝildojn ĉe oficejoj, kiajn indikas sekcio Groningen. Intertempe la prezo de la ŝildoj duobliĝis, sed la ĉefestraro volonte fabrikigos novajn, se la sekcioj kune kun la mendoj sendos la ŝuldatan monon.

La ĉefo de la propaganda servo estu membro de la ĉefestraro.

Klarigo: Tio estas organize pli bona ol la nuna stato; la kontakto inter la propaganda servo kaj la ĉefestraro estos pli firma.

Opinio de la ĉefestraro kaj la gvidanto de la propaganda servo: Firma kontakto neniel kondiĉas membrecon de la ĉefestraro.

Ĉiu ĉefestrarano vizitu de tempo al tempo la sekciojn en sia distrikto por plifirmigi la kontakton.

Opinio de la ĉefestraro: Vizito al la distrikta sekcio apartenas al la tasko de la ĉefestraranoj, kiuj ricevas la vojaĝkostojn el la asocia kaso. Sed kion fari, se iu ĉefestrarano ne emas vojaĝi?


TEATRA SERVO L.E.E.N. JARRAPORTO.

En 1950 la nombro da sekcioj, kiuj pruntis teatraĵetojn, estis malpli granda ol kutime. La prunteprenantoj atentu, ke ili ne retenu la materialon pli longe ol estas necese. Kelkaj sekcioj retenis diversajn skeĉojn preskaŭ unu jaron!

Krom teatraĵetojn ni kelkfoje pruntedonis tekstojn de prelegoj al personoj, kiuj deziris fari propagandon. Danke ni ricevis kelkajn donacojn, per kiuj ni povis pligrandigi nian provizon.

Elspezoj: afranko g. 2,75
aĉetita verko g. 4,90
A. J. Kalma. g. 7,65

L.E.E.N. — FLLE. AL HILVERSUM



Ĉu vi iros al Hilversum? Fakte tiu demando estas superflua, ĉar kiu ne dezirus partopreni la nunan Esperanto-Benelux-Kongreson, kiu je Pentekosto -en la plej bela monato de la jaro okazos meze en Nederlando?

Por la flandroj la vojaĝo tien estos eĉ ĝojo aparta, precipe se ĝi okazos karavane, kaj same por la nordnederlandanoj.

Vi do certe venos, sed ĉu vi jam sciigis vian partoprenon al la L.K.K.? Kaj se ne, kial vi prokrastas tion? Profiton vi havos, se vi frue aliĝos, ĉar la kongres-kotizo plialtiĝos post la 15-a de aprilo. Krom tio ni ja interkonsentis ĉi jare atingi jam 200 aliĝojn antaŭ marto. Tion proponis la L.K.K. kaj vi silente aprobis, ĉar aŭdiĝis neniu protesto. Sed pluraj el vi forgesis, ke tiu aprobo postulas de vi aktivecon kaj ne pasivecon, kiun bedaŭrinde ankoraŭ tro multaj aplikas.

Ni fervore laboras por en majo akcepti niajn gastojn kiel eble plej bone kaj nun estas la ĝusta tempo por administraj aferoj kaj la registrado de kongresanoj. Tuj antaŭ la kongreso la L.K.K. havos sufiĉe por fari kaj ĝi ne tre emas laboradi dumnokte plezure al tiuj, kiuj nur lastmomente aliĝas kaj kiuj same bone povas fari tion jam nun. Vere, ni pretas multe labori por havigi al vi agrablan kongreson, sed ĉiu laboro je sia tempo!

FINANCA STATO L.E.E.N.

ENSPEZOJ	Budĝeto '50	Jarkonto '50	Budĝeto '51
Kotizoj	f 3200,—	f 3394,08	f 3000,—
Donacantoj	100,—	148,45	150,—
Abonoj	100,—	113,87	100,—
Skriba kurso	25,—	25,75	25,—
Libro-Servo	100,—		100,—
Ekstraj donacoj		83,—	
Anoncoj		7,50	
Deficito		19,82	100,—
	f 3525,—	f 3792,47	f 3475,—
ELSPEZOJ			
Organo + redaktoro	f 1850,—	f 2173,95	f 1900,—
Kunvenoj ĉefestraro	350,—	426,—	400,—
Administra estraro	350,—	311,53	325,—
Repago sekciaj delegitoj	192,—	193,08	180,—
Kontribuo U.E.A.	250,—	250,—	235,—
Ekzamena Komitato	15,—	15,—	15,—
N.C.K.E.	30,—	30,—	30,—
Biblioteko	35,—	25,—	25,—
Reprezentado Univ. Kongreso	200,—	100,—	100,—
Oficejo „Esp. ĉe la Instruado“	50,—	50,—	50,—
Salono jarkunveno	40,—	40,—	40,—
Distrikta ĉefestraranoj	10,—	17,93	10,—
Teatra servo	5,—	7,65	5,—
Propagando	118,—	25,98	100,—
Malplivalorigo skribmaŝino	30,—	30,—	
Diversaĵoj		96,35	60,—
	f 3525,—	f 3792,47	f 3475,—

BILANCO 31 Decembro 1950

Poŝtgirkonto L.E.E.N.	3357,56	Kreditoroj	458,62
„ Someraj kursoj	25,—	Rezervo Someraj kursoj	285,24
Kaso	3,44	Propaganda kaso	278,36
Skribmaŝino	90,—	Kongresa kaso	66,27
		U.E.A.	121,03
		Kotizoj 1951	140,—
		Donacantoj 1951	8,80
		Abonoj 1951	3,94
		Kapitalo	
		1.1.'50	2133,56
		deficito	19,82
			2113,74
	g 3476,—		g 3476,—

NIAJ ESPERANTO-ENIGMOJ KUN PREMIOJ.

PREMION akiris por VEB, post n-roj 101-102: s-ro Goedgezelschap, el Mechelen; kaj por LEEN: s-ro P. H. Mooy, el Brussel.

SOLVOJ.

N-ro 103. Kalkano, membrano, turbano, korano, fazano; bazaro, kafaro, riparo, korsaro, barbaro; etaĝero, papero, kolero, vespero, konkero; kometo, menueto, soneto, baletto, korveto.

N-ro 104. *Horiz.*: 1. vinber; verk. 2. ulul; eglefin. 3. ter; tine. 4. Turkuj; kod. 5. uj; abunda. 6. eden; pen. 7. ol; nikel; ru. 8. avel; paser. 9. rafanet; kuli. 10. glad; valid. 11. ĉen. 12. letargi; trem.

Vert.: 1. vultur; argil. 2. il; uj; oval. 3. nutr; elefant. 4. biekad; lad. 5. ruben; er. 6. re; juniper. 7. ge; kat; ĉi. 8. adres; ve. 9. vet; lekant. 10. efik; rul. 11. rinocer; lice. 12. kned; numid.

N-ro 105: MALKOVRU

en la suba teksto radikojn (minimume kvarliterajn) de substantivoj, nomantaj partojn, organojn, substancojn de la homa korpo.

Se vi zorge kribrus tiun muelitan tritikon, vi ekhavus blankan farunon. Bonvole indiku butikon, kie mi povos aĉeti migdalojn aŭ juglandojn.

Per kia rimedo li forigu la ruston? Ĉu per petrolo? Sed ĝi estas nur portempa solvo: la stango ja baldaŭ denove rustiĝos. Male, oleo pli longtempe ŝirmos la feron.

Pala tajloro, ŝajne senforta, kuraĝe iris suden tra la densa arbaro por renkonti la kruelan giganton. Kiel solan armilon li kunportis pintan bastonon. Sennuba estis la ĉielo, tamen tondra bruo aŭdiĝis el la malproksimo.

Aŭdinte strangajn rimarkojn pri mia invito, mi insiste petus vin eviti ĉiun akran, ironian kritikon. Sciu, ke, invitante lin, mi turnis min nek al kanajo, nek al stultulo. Plie, mi ege dezirus, ke vi ne moku la novan gaston, pro tio ke li ne havas multon por elspezi.

Ekz.: „rusto makulas“ = stomak.

N-ro 106: KRUCVORTENIGMO.

Horizontale. 1. Germana aŭtoro kiu

verkis originalajn Esperanto-romanojn. 2. interna deklivo de fosajo aŭ fortikaĵo(R). 3. duberuĝa; grupo(R). 4. difekti ion, krispetigante ĝin(R). 5. distingilo pri vero kaj malvero(R); resoni. 7. streĉa, kunliganta interplektiĝo(R); la pli granda kvanto(R). 8. esti faranta. 9. ekstrema flanko de konstruo(R); komuna diro(R). 10. presajo sciiganta la aktualajojn(R). 11. ĉesigi bruladon(R).

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11
1	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■
2	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■
3	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■
4	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■
5	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■
6	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■
7	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■
8	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■
9	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■
10	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■
11	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■

Vertikale: 1. plurfoje ripetita parto de kanto(R). 2. numeralo; kunfiksi du metalajn pecojn(R). 3. meritanta esti posedata pro la plezuro kiun ĝi donas. 4. estiĝi(R); surmeti veston al ies manoj(R). 5. meti ion en akvon. 6. rifuza; grasa fluaĵo(R). 7. sudamerikaĵo(R). 8. rapide, abrupte kaj ripetite ŝanceli; sufikso(R). 9. naskipova(R). 10. prepozicio; al iu loko; 11. duvorta titolo de romano, verkita de la suprenomita aŭtoro. Ĝi havas la antikvan Babilonon kiel historian fonon.

La solvojn sendu la nederlandanoj al S-ro G. J. Teunissen, Burg. Tellegenstr. 21 hs., Amsterdam-Z.; kaj Flandra Ligo al Postbus 342 (Enigmoj), Brussel, antaŭ la 20-IV-51.

KASKONTROLO

La subskribinto kontrolis la financon administradon de L.E.E.N. pri la jaro 1950 kaj trovis ĉion en bona ordo. Li deklaras, ke la bilanco de la 31-a de dec. '50, montranta kapitalon de g. 2113,74 same kiel la etato de en-kaj elspezoj indikanta deficiton de g. 19,82 donas ĝustan bildon pri la financa stato de L.E.E.N.

Li proponas malsarĝi la kasiston je lia financa administrado, dankante lin pro lia laŭdinda akurateco.

P. v. Geel
kalkulkonsilanto

FLANDRAJ POETOJ EN TRADUKO

LA VESPERA KORNO (DE AVONDTROMPE)

Guido Gezelle

Kornblovas la bovin', je V'fin'
ŝi lacas pro mordado;
tra juna herbo, en eben',
de V' peza mam' portado;
mam' peza, je vesper' ĉe ter'
pendanta pro laktplen',
svingiga en pašada stat'
kun forta korpa ĝen'.

Si kornblovas, por ke for
ŝi en melkejon venu;
por ke, sensarĝa, tie ŝi
la laktan ne plu tenu;
laktajon bonan, puran nur
kaj dolĉan, kies grav'
al ĉiu certas pro V' favor' —,
mangaj' — trinkajenhav'.

Kornblovas la bovino; ĝin
la homo samkomprenas:
post laborado, ŝvit', rigid',
li al ripozo emas.
Senfortaj, hom' ,bovino sin
pretigas nun al ven',
post la somera lac' ,de V' pac'
kaj de la nokta ben'.

trad. H. Vermuyten.

EEN UITWEG: ESPERANTO (uit „De Esperantist“)

Wie in zijn wetenschappelijke werk gedwongen wordt publicaties te lezen in het Nederlands, Engels, Frans, Duits, Zweeds, Deens, Noors, Spaans, Italiaans, Portugees, Russisch, Tsjechisch, Pools, Fins, Japans, uit vaak genoeg een min of meer krachtige verwensing, dat zijn talenkennis zo beperkt is, ook al voelt hij zich door een vage bekendheid met een stuk of acht talen al bevoorrecht boven vele anderen.

Plaatselijk Nieuws.

Prelegoj de prof. d-ro I. Lapenna. Ni ne publikigos apartajn raportojn el la lokoj kie prof. Lapenna prelegis, ĉar ili ja estus pli-malpli egalaj. En ĉiuj lokoj, kie oni aranĝis publikajn kunvenojn (Leiden, Amsterdam, Haarlem, Groningen, Utrecht) escepte en Eindhoven, kie la fuŝarango kaŭzis al prof. Lapenna sendorman nokton, li post mallonga enkonduko pri la nuna stato de Esp. faris lumbildprelegon pri Jugoslavujo kaj poste (nur en esp-ista rondo) oratoris pri la sekcia vivo. El ĉiuj tiuj lokoj, escepte el Eindhoven atingis nin entuziasmaj raportoj kaj gazetartikoloj, kiuj atestas pri sukcesplajn kunvenoj kaj gazetarkonferencoj. En Leiden ĉeestis proks. 100 pers., en A'dam 300, en Haarlem 225 en Groningen 100 kaj en Utrecht 200. Prelegoj ne-publikaj okazis en Leeuwarden (100), Arnhem (100), Den Haag (175) kaj Rotterdam (100). Estas bedaŭrinde, ke ne ĉie oni utiligis la okazon propagandi aranĝante publikajn kunvenojn.

La faktoj plene malpravigis la skeptikulojn kiuj dubis, ĉu eblas kontentigi per unu programo du kategoriojn: esp-istojn kaj ne-esp-istojn. Kelkaj klopodis kredigi al ni, ke inter la membroj, kiuj jam dum pli ol 15 jaroj portas la verdan stelon, troviĝas neniu, sufiĉe kompetenta por traduki. Iu sekcio ne sciis, kiel altiri al la kunveno ne-esp-istojn. Nu, ekzistas problemoj, malpli facile solveblaj! La klarviduloj, kiuj ne okazigis gazetarkonferencojn, „ĉar la raportistoj tamen ne venos“, malpravigis. Ĉie kie oni serioze klopodis, oni sukcesis, eĉ ĉe A.V.R.O.

Ni esperas, ke ankaŭ prof. Lapenna mem estas kontenta pri la atingitaj rezultatoj; ke li sentis sin hejme en niaj rondoj kaj jese povis respondi la demandon faritan al li de iu el niaj anoj: „ĉu vi jam alkitimigis al nia lando, kie katoliko ne estas kristano kaj socialisto ne estas demokrato?“

Silentante pri kelkaj neglataj kaŭzitaĵoj de dietantismo, ni povas diri ke la aranĝo plene sukcesis, ne nur dank' al la prepara laboro de la organizantoj, i.a. s-roj Ch. Slijper, G. F. Makkink, J. Rooker, H. J. Blokker kaj M. v. d. Kreeke al kiuj ni ŝaldas multan dankon, sed ĉefe dank' al la energio kaj elokventeco de la nelacigebla preleginto, kies agado efikis al niaj samideanoj kvazaŭ refreŝiga bano kaj konvinkis multajn ne-esperantistojn pri la seriozezo de nia afero.

Den Haag: 5-IV Diskutado pri vivi-sekcio. 12-IV Miksaĵo. 19-IV Kompleta A-ekzameno. Nepre ĉeestu! 26-IV Poezio de s-ro M. E. Nawijn.

Hilversum: 5-IV Ni ne kunvenos. 12-IV Prelego kun lumbildoj pri folkloro. 19-IV La kongreskomisionoj raportas. 26-IV Vojaĝrakonto kun interpretado. 3-V Posttagmeza promenado; kolektiĝo ĉe la ŝtonego je la 15.00 h. Vespere ne okazos kunveno.

Wie in internationale besprekingen de misverstanden heeft bijgewoond, die het gevolg zijn van verkeerd begrijpen van een vreemde taal, zelfs door zogenaamd bevoegde tolken, wie de verwarring in de tegenwoordige wereld aanschouwt, die grotendeels ook veroorzaakt wordt door een onjuist interpreteren van een in een vreemde taal gesproken of geschreven uitzetting, die kan niet anders dan wensen, dat er een weg gevonden wordt om aan deze misverstanden een eind te maken.

En wanneer dan de aanvaarding van een of andere veel verspreide taal als wereldtaal op nationalitistische gronden misschien op onoverwinnelijke weerstanden stuit, terecht of ten onrechte, dan is er maar één uitweg: ESPERANTO.

Prof. dr M. J. Sirks

LA FORFLUGINTA KANARIO (fino)

Jes, li pravis. Ili komprenis, kaj ĉiu samtempe mallevis la kapon por pensegi. Dum longa tempo ili parolis pri bastonoj kun gluaĵo, pri retoj, pri pecoj da sukero sur la tero apud kaptiloj, pri salo melota sur la voston, eĉ pri urbestro fajfante alloganta la besteton.

Fine la plej aĝa konsilanto ekstaris dirante: „Via urbestra moŝto! Viaj sinjoraj moŝtoj! Mi komunikas al vi, ke mi trovis la universalan rimedon kapti la kanarion. Tiu kaptado estas gravega por ni. Fakte la humoro de ŝia urbestroedzina moŝto influas la humoron de lia urbestra moŝto. Kaj nia intereso estas, ke lia urbestra moŝto estu gaja, vera patro por niaj urbanoj. Por tio ni devas oferi ion.“

Rigardante la malplej aĝan konsilanton, li daŭrigis: „Precipe le nedzigiĝintoj inter ni, kiuj ŝatas promenadon dum lumbrilaj vesperoj kun fraŭlino en apudurba vilaĝo, nun montru siajn

BIBLIOGRAFIO

Jarlibro U.E.A. 1951; 256 p. Neaĉetbla, sed ricevebla nur de Individuaj Membroj de Universala Esperanto-Asocio. Kotizoj troveblaj sur p. 43.

Ĉi-jare tre frue aperas nia jarlibro. Ĝi impresas kiel tre dika libreto, kaj fakte ĝi estas tia. Tio meritas nur gratulojn. Ni trovas en ĝi la kutimajn interesajn rubrikojn (delegitoj, librolisto listo de eldonejoj, Akademio, Universala Kongresoj, Fakaj Asocioj ktp.) Pli kompleta ol antaŭe ĝi donas ĉi-foje la Esperantistajn aranĝojn en 1951, la regularon de la Internacia Somera Universitato, informojn pri la Gazetara Servo kaj same pri la Koresponda: tiuj novaj sciigoj estas nepre bonvenaj kaj sendube pligrandigas la utilon kaj la uzeblon de nia jarlibro.

F.L.E.-membrojn tamen mirigas la fakto ke la nomo de la urbo Brugge aperas ree kiel „Bruges“ (la franclingva nomo de tiu urbo, kiu tamen estas flandra kaj kredeble situas en flandra provinco); same pri *Wijchmaal* kiu situas en la provinco Limburgo, anstataŭ *Wijmaal* (apud Lovenjo).

La preso kaj la ekstero estas nepre prizorgitaj kiel kutime.

La novaj kvalitoj de la UEA-Jarlibro sendube instigos multajn niajn membrojn aliĝi al tiu Asocio, almenaŭ kiel Membro-Jarlibro por ke ankaŭ ili ĝuu la avantaĝojn, kiujn ĝi prezentas.

P. Clissold „*Marista Terminaro*“, (eld. U.E.A., Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo) jam estas la 10-a fakteterminaro, eldonita de U.E.A. Laiko versajne ne interesigos pri la multaj terminoj, kies tradukon li en sia propra lingvo eĉ ne komprenas, sed fakuloj sendube bonvenigos la 62-paĝan vortaron, kiu enhavas ne nur Esp. difinojn sed krome tradukojn en franca, angla, germana kaj hispana lingvoj. Prezo 1 \$ 6 p.

Brugge, la artjuvelo de Belgujo: il. faldfolio pri tiu bela flandra urbo. Adr.: Urba Servo por Turismo. Dijver 16, Brugge.

Historio de Yukawa Teorio, verkita kaj eldonita de Esperanto-Rondo en Naturscienca fakultato de Osaka Universitato. 25 p. 1950- prezo 40 Fr.fr. Mendebla de Japana Esperanto-Instituto TOKIO - Hongo Motomati 1-13 Japanujo.

ANONCETOJ

L. Gerlach, Borstiusstr. 2, Zaandijk, 37-jara instruistino, serĉas samideaninon, kiu volas iri ŝipe kun ŝi al Nord-Norvegio en la somera ferio.

500 gegrupanoj deziras korespondi, kaj intersangi pk. kaj pm. Ili nepre respondos. Adreso: „Esp. Koresponda Grupo“, 260 Oka-Shinmachi, Hirakata-City Osaka, Japanujo.

fidelecon kaj sinvegon en tiu ajero!
La malplej aĝa konsilanto tre malĝojigis. Ĉu tiu katastrofo pri la urbestroedzina kanario malebligis lian promenadon kun Elinjo, la ĉarma knabino, kiu loĝis en vilaĝo apud la urbo? Li estis eksaltanta kaj batonta la tablon per la pugno — — — Subite envenis en tiu konfliktplena momento Sofinjo, kiu plej afable diris: „Sinjoro urbestra moŝto! La sinjorino salutas vin, kaj ŝi petas, ĉu vi jam trovis solvon?“

„Eksidu ĉi tie, Sofinjo,“ respondis la urbestro montrante seĝon. „Tiu sinjoro konsilanto jam trovis bonegan solvon. Aŭskultu lin bone!“

Post tio la plej aĝa konsilanto alrigardis ĉiujn, montrante sian famkonatan inteligentan mienon, kaj solene diris: „Sinjoro urbestra moŝto! Estas mia opinio nur unu sola rimedo por rehavi la kanarion de la urbestra edzino,“ kaj emfaze li aldonis: „Mi proponas tuj fermigi la urbajn pordegojn.“

Aŭdinte tion, ĉiu komprenis la taŭgecon de ĉi tiu propono, kaj voĉdonante ĉiuj aprobis, eĉ la malplej aĝa konsilanto. Sed hejmenvenante ĉi tiu decidis sekrete subaĉeti la pordegardiston.

Pro tio kaj nur pro tio la kanario neniam revenis. Se la pordegoj estus restantaj jermitaj, oni certe estus kaptinta la flavan besteton. Sed la knabino en la apudurba vilaĝo ja estis tiom kara kaj tiom ĉarma!

(Laŭ malnova legendo trad. C. B. Zondervan)

Verantw. uitgever: Vlaamse Esperantisten-Bond Postbus 342 — Brussel en Ned. Esperantisten-Vereniging LEEN, Stadionkade 6 Amsterdam Z. (Ned.) — Drukkerij Krol, Hoofdstraat 31, Uithuizen (Ned.)

REDAKCIA SCIIGO

Manuskriptoj por la maja numero atingu la redaktoron antaŭ la 15-a de aprilo.

H. M. MULDER
Secr.-Penningm.esse.